# & El la kamparana milito 1525:

< Ripete 39 sed rekante 32 el 64 batoj por strofo, entute 512 paŝoj dum 5 minutoj. El germana tradukis N. B.>

**(#Melodio:**

<1,9:4> (

La /La aTi dodo rere /mi ifa mi h; /mi i la afa /mi h h; mi /re fafa mi re /do Ti La a; /Ti i mi imi /La h h h;

(#Rekantaĵe: 2× /La ado mi h /fa la mi h /redo Tido re fa /mi mi La h)

)×8 )+

**(& Strofoj:**

'1 Ni /estas Gajerana /nigra band', ; /heja o/ho! ; Ti/ranojn forbatos /ni el land', ; /heja o/ho!

(×: 2× /**Al atak', /el bivak', /Ruĝan kokon metu /ĉe l' monak'**.)

'2 Ni volas ĉe l' di-sinjor' plendi, ; kirielejs, ; Ke ni pastraĉon povu mortefendi, ; kirielejs. .....

'3 Dum Ev' laboradis kaj Adam', ; kirielejs, ; Nobel' kie estis do tiam? ; kirielejs. .....

'4 Nun abatejojn trafu pest', ; heja oho! ; Ni sekvas nur al Manifest', ; heja oho! .....

'5 Nin Florjan' Gajer por repago ; Gvidas al ag'. ; Kun "ligŝu"' sur lia flago, ; Kiras' kaj kask' en lak'. .....

'6 Ĉe Weinsberg brul' kaj rab' okazis, ; heja oho! ; Tre multaj siajn vivojn lasis, ; heja oho! .....

'7 Filinon, nobelan ni sen per', ; heja oho! ; Abismen' sendis al infer', ; heja oho! .....

'8 Venkitaj iras ni hejmen je fin', ; heja oho! ; Pli bone nepoj finos ĝin, ; heja oho! .....)